AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno XV, Fünfhausgasse 16, Austrio. — Telefono R 33-3-64

8a jaro APRILO 1953 m-ro 4

INFORMOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

La helpo al Nederlando. La kolekto, farita de AEF , je redaktofino rezultigis la sumon de S 2.861.-. Kontribuis ges-anoj Waldhauser, Seiwald (po 10), Diamant (20), Pachmann (30), Hubalek, Dvorak, Gasperini, F.Fischer,Kolitza, Stowasser (po 20), Steiner(Wörgl, 50),grupoj Wattens (60), Gmunden (25), Innsbruck (160),Felixdorf (158), Graz (141),Salzburg(AKLE, 275),Supra Aŭstrio-Linz (503).

Kolektokampanjo "Presilo" havigis ĝis nun la sumon de S 659.75.Donacis la ges-anoj F.Fischer,Jorde, Mosek Cipera, Karras, Seiwald, Postl, Haberl, Arbinger, Lederer, Heilinger (po 10), Babovka (15), Reiter (Salzburg 6.60), prof. d-ro Hainschegg, E. Dittrich (po 20), parolado kun lumbildoj Kalocsay-Laboro (33.15), Hofrat Steiner (100), grupo Hohenberg (10). Raporto daŭrigota!

Universala E-Kongreso en Zagreb: Ciuj ges-anoj, pagfintaj ĝis 31.12.52 sian kotizon kaj ankoraŭ ne ricevintaj la kongreskarton, bv. tuj anonci en la E-Centro.

50 pecoj de la nova propagandilo "Wissen Sie, dass ESPERANTO ...", presita en la E-Centro,kostas S 1.-.Mendu ĝin en la Centro!

Meritas niajn aplaŭdon kaj dankon nia s-ano Josef Z i n k ,kiu idealisme ŝarĝis sin per la kompilado de la ĉiumontaj, dudekminutaj radioparoladoj el Radio Vieno pri la aŭstria fervojista E-movado.

Sveda Somera Semajno,temo 1953: "Internacia Kulturinterŝanĝo", okazos de 9.- 16.8. en Frostavallen, Höör (provinco Skanio - Suda Svedio, prokisme de Malmö). Prelegos prof. Ivo Lapenna, Julia Isbrücker kaj rektoro Karl

Söderberg. Kostoj de restado po tago sv.kr.13.75 (ĉambro 2-lita) aŭ sv.kr. 12.50 (ĉambro 4-lita).Eblas subvencioj de la sveda Ŝtato por la vojaĝkostoj.Demandojn kaj anoncojn direktu baldaŭ ege al s-ano Jan Strönne,Admiralsgatan 36, Malmö, Svedio!

Komence de aŭgusto okazos en Sheffield,Worthley Hall-Anglio, la 26a SAT-Kongreso (organiza komitato : SATEB-grupo,19, Brentwood Grove,Birmingham 22 A). Detalajn informojn petu,sendante respondafrankon,de SAT-ĉefperanto, s-ano d-ro A. Karner, Stams, Tirolo.

K.E.L.I. (Kristana e-ista Ligo Internacia)-Konferenco 1953 okazos la 4.-10.8.en Rüdlingen-Svisio.Informas s-ano Fritz Liechti, Zürich 50, Wallisellenstr. 429.

Fingrulino
fabeleto

laŭ Chr. Andersen, bildoj: Gerda Born, eldonejo Waldheim-Eberle-Vieno
Prezo: S 8.--;
Mendebla ĉe "TRAMONDO", Vieno XV.,Fünfhausg.16, telefono: R 33 3 64
Jen fabeleto, pro sia ĉarma aperformo certe unika en la Esperanta literaturo. Ĝin posedu ĉiu Esperantisto. La traduko estas de prof.d-ro Sirk.

Internacia Jumular-Kongreso okazos de 3.-10.8. en W ö r g l , Tirolo. Junaj aŭstriaj ges-anoj petu pro detalaj informoj la aranĝanton, s-anon Hans Steiner, Wörgl, Augasse 42.

S-ano magistro Franz H ö f e r t , ĉefdelegito de UEA, petas, atenti lian nunan adreson: Vieno XIV., Penzingerstr. 121, tel. A 51 1 09 L.

Arbeiterkammer (Laborista Ĉambro) subvenciis AEF per la sumo de S 3.000.--

Esperantistaj veteranoj (E-istoj antaŭ 1914) estas petataj,sendi al la Internacia E-Muzeo,Vieno I.,Hofburg, Michaelertor, unter der Kuppel, por la Panteono de la E-movado siajn a) nomon kaj adreson,b) foton,c) mallongan biografion.

A U S T R I A E S P E R A N T O - K R O N I K O

VIENO: Sabate, la 18.4., je 18.30 okazos en Volksbildungshaus Alsergrund, IX., Galileigasse 8, partere dekstre, m e m o r k u n v e n o pri Z a m e n h o f . Parolos s-ano Ernst Werner, kantos s-ino Valerie Morelli kun akompano de s-anino Hermine Peschl, Vienaj ges-anoj, venu multnombre!

SUPRA AÛSTRIO: En la ĝeneralkunveno de la E-istoj el Supra Aústrio, okazinta la 15.2.1953, estis reprezentataj la grupoj Vöcklabruck, Wels, Steyr kaj Linz ("Estonto" kaj Fervojista fakgrupo). Kasraporto montris pozitivan saldon. Vöcklabruck anoncis regulan aktivadon, kelkaj anoj intencas veturi Zagrebon; Steyr raportis pri malprogreso, tamen okazas kunvenoj en privata loĝejo. En Wels malgraú malfaciloj daúras kurso; la grupo nombras 5 membrojn. Gmunden raportis pozitive. La grupeto duobligis sian membraron kaj havas nun 8 anojn, kiuj kunvenas lunde, 20 h, en la loĝejo de la estro, s-ano Grausgruber, Bahnhofstrasse.(Laú raporto al la E-Centro s-ano Pöschko Anton, Gmunden, Tagwerkergasse 2, estas servema, doni informojn pri la somerrestado (ankaú ĉe kamperanoj) en Gmunden kaj Salzkammergut. Interesitoj estas kore invitataj apud la bordon de la verda Traun-lago!). El Linz oni eksciis, ke la "Vojaĝklubo" estis likvidata, ĉar la E-istoj ŝajne ne disponas pri sufiĉe da mono por vojaĝoj al eksterlando. Kontentige resumis sian agadon la Fervojista Fakgrupo, kiu disponas pri tri kursoj, bone vizitataj. Laú s-ano Nigl la afero "Esperanto-Servo"-tabuloj nun bone funkcias. De Oftering mankis raporto. - La nova landestraro konsistas el ges-anoj Nigl (estro), Zeller (vicestro), Hollinger (sekr.), Kaufmann (viceskr.), M. Gruber (kas.), R.Kirchmayer (vickas.), Moser kaj Zeller (kontrolo). La landa organizo decidis, dissendi 4foje jare la gazeton "La Spegulo" kun subtitolo "Der Spiegel" germanlingve al 380 lernejoj en la urboj de Supra Aústrio. La enhavo por tiuj n-roj estu speciale adaptita por la instruistaro.

STIRIO: S-ano d-ro Oskar Meister, Graz, porgazetara referanto de la E-asocio "UNUECO", raportis al nia re-

dakcio, ke li sendis al la altlernejoj de Graz, Leoben kaj Innsbruck leteron, en kiu li atentigis pri la sukceso de la universitato de Lund, kiu, intencante esplori la spertojn pri la manĝado de ĉevalviando, estis uzinta Esperanton por diskonigi sian demandaron. Laú la dankletero de la universitato de Lund ĝi ricevis 90 informojn el 35 ŝtatoj. En konekso kun la sciigo pri tiu fakto s-ano d-ro Meister invitis la universitatojn de Aústrio, simile al la universitato de Lund, sin servigi por siaj enketoj per Esperanto.

SALZBURG: Gratulon al la Salzburga Esperanto-movado pro la resaniĝo de s-ano Franz F ö t t i n g e r, kiu, operaciita dufoje, estis malsana dum pli ol du jaroj! Laú lia karto al la E-Centro li sentas sin denove sufiĉe forta por povi dediĉi sin al la Esperantoaferoj. Li anoncas, ke multaj ges-anoj eksterlandaj, veturante al Zagreb, venos al Salzburg, inter ili Teo Jung kun edzino, Gunar kaj Inga Ringh kun 20persona vojaĝgrupo el Svedio. Li invitis ĉiujn al partopreno al la Aústria E-Kongreso en Klagenfurt. Sveda karaveno kun 45 personoj, hejmenveturante de Italio al Svedio, venos la 13.7. al Salzburg.

Raporto de l'16.3.53 al AER de "Estonteco"-Salzburg: La 15.3. la AKLE-grupo festis sian 25jaran jubileon. Antaútagmeze je lla h. okazis komunuma meso en St. Michaelskirche. Vikario Josef K a p s celebris la meson kaj predikis en Esperanto. Tio estis la u n u a Esperanto-Diservo en Salzburg. Venis multaj ges-anoj, precipe ankaú de la grupo "Verda Stelo". Posttagmeze la jubileanta grupo kunestis dum la jarkunsido. S-ar Kaps denove estis elektata kiel prezidanto. La duan lokon okupas katedrala kanoniko d-ro Macheiner. Oni decidis: ĉiu ano devas aparteni almenaú aú al AEF aú al IKUE, plej bone al ambaú. Tiun ĉi novan laborjaron oni deklaris kiel "jaron de varbado kaj de novaj grupanoj kaj de Esperanto-amikoj". La diskuto pri la diversaj punktoj fariĝis fajre viglaj! Dum la tuta aranĝo ni havis la ĝojon, festi en ĉeestado de nia altŝatata kaj meritplena honorprezidanto s-ano pro. d-ro Franz Christanell. - Por la somersemestra E-kurso en la Salzburga popola altlernejo enskribigis sin 18 gekomencantoj.

Reiter.

TIROLO: La 25.1.53 kunigis en Innsbruck la reprezent - antojn de la E-movado en Tirolo kaj Vorarlberg por la ĉijara ĝeneralkunveno de la E-landestraro por ambaú liglandoj. La balatoj rezultigis jenan estraron: AEF-landestro: Hans Steiner, vice Martin Stöckl, Walter Gnaiger; sekretario: Josef Erlacher, kasistino Therese Kainer, propagandestro: Rolf Hauser, vojaĝservo: Martin Stöckl, kontrolo: Franz Mitterberger , Otto Steiner.-

Laú "IIO" I/53 anoncis sin por ĉi tiu somero aútobusa karavano kun 90 genederlandanoj, kiuj venos por vidi la Zamenhof-monumenton. Ili restos en Wörgl dum 7 tagoj. - "IIO" II-III/53 dedicas 3 1/2 paĝojn al la jubileanta aústria Esperantopioniro Hofrat Hugo Steiner. El ili ni ekscias, ke okaze de lia 75jariĝo venis al li pli ol 100 gratulleteroj kaj-telegramoj el la tuta mondo. Inter la aústriaj eminentuloj "IIO" citas speciale jemajn personojn: kardinalo d-ro Innitzer, ekskanceliero d-ro ing. Figl, instruministro d-ro Kolb, Sektionschef d-ro Dworschak, ĝeneraldirektoro de RAVAG, d-ro Guggenberger, ktp. El Esperantujo inter aliaj honoris Hofrat Steiner la prezidanto de UEA, Ernfrid Malmgren, Paul Nylen, Teo Jung, Hans Jakob,pastro Carolfi.La Vienaj gazetoj "Wiener Zeitung", "Wiener Tageszeitung" kaj "Kleines Volksblatt", Radio Vieno I, Radio Rot-Weiss-Rot publikigis la jubileon de s-ano Steiner, same "Heroldo de E.", "Esperanto-Post" kaj "La Ponto". - Kufstein, E-klubo "PIONIRO": En letero de 1'1.3.53 la klubo per siaj estro kaj sekretario anoncis al la E-Centro, ke, konforme al la decido dum la ĉijara ĝeneralkunveno, okazinta la 25.2., la tuta membraro komplete aliĝas al AEF. La novan estraron formas ges-anoj Hans Steiner (estro), Ambros Stöckl, Hermann Visneider, Hildegard Winkler, d-ro Alfons Huber, August Kaufmann. Okazas E-kurso por komencantoj. - S-ano Alois Hilkersberger, Landeck, la konata E-pioniro kaj konstruinto de la Esperanto-Hejmo "FRATARO", estis eknomata honormembro de la Mondcivitana Ligo de Aústrio.

VORARLBERG: Bregenz. Per letero de s-ano S e i w a l d alflirtis la E-Centron ĝojiga vivsigno pri la tiea movado. Kunvenas grupo kun 10 membroj.

AÙSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO

en siaj lastaj kunsidoj (ĉiam la duan merkredon de ĉiu monato, je la 17a h en la E-Centro) okupiĝis ĉefe pri la kompilado de la Aústria Esperanto-Antologio, kies unua kajero nun estas finpreparita. Ĝi aperos tre baldaú en la Esperanto-Eldonejo "TRAMONDO", verŝajne dulingva, por ke oni povu kompari la tradukaĵojn kun la originalaj tekstoj.

Por la kunsido de la AEInstituto en la 6a AEKongreso en Klagenfurt estas decidita jena provizora programo: 1. agadraporto, 2. parolado, 3. lingva diskutado. Tempo kaj loko de la kongresa kunsido, la temo de la parolado kaj la parolonto estos ankoraú konigataj.

E. Werner, sekretario.

Esperanto kaj la aústriaj blinduloj.

La Aústria Societo de Esperanto-Instruistoj per sia sekretario, s-ano Leopold G s c h a n e s,ree interessis la centran aústrian porblindulan instituton en Vieno II., Wittelsbacherstrasse pri Esperanto kaj ĝia neceso por la blinduloj. S-ano Gschanes mem lernis la Brajlan skribon kaj eldonigas per A.S. de E.I. varbilojn sub la nomo "Österr. Esperanto-Werbereihe für Blinde"(Aústria E-varbserio por blinduloj). Nia fervora s-ano daúrigas en dankinda maniero la siatempan agadon de nia fama kaj bonkora Esperanto-poeto kolonelo Franz Zwach kaj jam korespondas kun blindaj s-anoj kaj E-amikoj.

R E C E N Z O

Karl Vanselow: Nia lingvo Esperanto.

Unua serio, konsistanta el tri kajeroj po 36 pagoj. Elektita poezio por deklamo kaj por kanto. Berlina Esperanto-Verlag, Berlin W 35, Winterfeldstr. 27.

Karl Vanselow estas al la E-istaro jam delonge konata de okaze publikigitaj poziaĵoj. Sed nur la nuna, kolektita eldono malkaŝas lin kiel eminente popùlaran poeton kun facila, admirinde flua lingvo, kiu ne nur vivas, sed viglegas per ritme kaj melodie vervaj versoj. Liaj plej

multaj poemoj kaj versaĵoj estas intence (kaj plensukcese!) skribitaj laú famaj kaj plaĉaj muzikaĵoj. Ili estas pli vere kantoj ol poemoj. Oni ne scias, kion admiri pli: ĉu la simplan, naturan lingvon, kiu facile fluas tra la poeziaj formoj, aú la entuziasmigan melodiecon de liaj kanteblaj, eĉ kantigaj versoj! Sorĉa ĉarmo des pli, ĉar lia lingvo ne estas arta, sed natura, ne artista, sed popularа, kaj rekte tuŝas ĉies koron.

Kiom nia spaco permesos, ni presigos ekzemplojn. Pri mendeblo kaj prezo de la kajeroj bedaúrinde mankas informoj. Ni havigos ilin. E. Werner.

K o r e s p o n d o

Ladislav Weiss, juna muzikanto, Ceskà Lipa, CSR;
Ivan Kuruhubeff, 20 jara studento, Nitra, Sladkovicova 26, kaj tri amikoj, CSR;
Farkas Mihály, juna lingvoinstruisto, (lingvoj, arto, filmo, teatro, literaturo, pedagogio, popol - danco, kantoj) Ormospuszta, All.Alt.Iskola, Borsod megye, Hungario;
A. Blickman, Schouwstraat 16, Nieuwendam, Nederlando (tropikaj akvarioj ktp.);

David S. Levy, 36 Green Dragon Lane, Winchmore Hill, London, N.21, Anglio, 20 jara oficisto;

Hermann Jeckel, Rottenburg/Neckar, Marktplatz 12, Germanio;

Albertino Alves de Almeida, Rua Espirito Santo, 362 Belo Horizonte, Brazilo;

Alfons Andersson, Lasarettet, Karlskoga, Svedio(pm.aústriaj kontrau skandinavaj - katal.Zumstein);
Bedrich Koranda, Praha XV, Podoli, Na Zvonicce 6/363;
Alexander Pawlowski, Poznań 6, uł. Szamarzewskiego 21-9, Polio (stud.med., filatelisto);
Jaroslav Jiŕasek, Hronov - Studynky 156, CSR (j.horloĝisto);
Kuanchi Stamp Exchange Service, 2, Hung Ron Li, Kweiyang Road, lst Area, Tientsin, Ĉinio, dez.interŝ. poŝtm.;
Domo de Rui Barbosa, Rua Sao Clemente 134, Rio de Janeiro, Brazilo, sendas senpage 293paĝan libron kun fotoreproduktaĵoj pro Rui Barbosa (1849-1923).

Vbb.
(Zl. 3216/47)

Faĉetbriloj el la Esperanto-mondo.

Preskaŭ duono de la nederlandaj parlamentanoj voĉdonis por la Esperanto-instruado. -- Sub la energia iniciato de prof. Hengwi Hong, Chunggu Universitato , Taegu, Koreo, viglas Esperanta aktivado: lernas 300 studentoj deve (!), sed la plimulto kun entuziasmo. -- Laŭ raporto al la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA la artikolo de prof. Lapenna pri la favora decido de UNESKO pri Esperanto aperis en 105 gazetoj kaj revuoj tra la mondo. -- Pasintan Kristnaskon lumis en la salonego de Ranelagh-lernejo, Ipswich, Anglio, 2 1/2meta kristarbo, sur kiu lumis 40 kandeloj, dediĉitaj de lernejoj el 17 landoj, inter ili el Aŭstrio (Volksschule Kirchbichl, Tirolo).- Mason Stuttard, konstanta kongressekretario de UEA, festis ĵus sian 50jariĝon kaj 30jaran esperantistecon. -- La Sveda Laborista Esperanto-Asocio aranĝos dum aŭtuno 1953 kun granda, ĉiutaga gazeto "Aftontidningen" "Tutmondan ekspozicion de infandesegnaĵoj", kies temo estas "Laboro kaj festo en nia hejmregiono". Sur ĉiu desegnaĵo estu notita naci-kaj E-lingve la nomo de la lando kaj titolo de la desegno, krome nomo kaj aĝo de la desegninto. Partoprenu geknaboj ĝis 15jaraj; ĉiu ricevos rekompencon. Adreso: Sveda Laborista E-Asocio, Barnhusgatan 8, Stockholm.- La honoran protekton de la Univ.Kongreso en Zagreb transprenis la prezidanto de la kroatia registraro, d-ro Vladimir Bakarić. La urbestro de Zagreb delegos du reprezentantojn de la urbo al la LKK por efike solvi la teknikajn problemojn de la kongreso. --

Sur ĉies ĉemizo kaj jako, mantelo
Sin montru publike en bril' Verda Stelo!

Eigentümer und Herausgeber: Österr.Esperantistenverband.
Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche W i e n XV., Fünfhausgasse Nummer 16
Druck:Offset Vervielfältigung,ADRESSEN-SUPPAN Wien IV., Brucknerstr.2, U 41-2-7o